

AVENO #50 - Homaj Rajtoj kaj Respondecoj – 2024

Ĝenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serĉas ion ĉi-sube: pli frue mi uzis la literumadon pere de „x aŭ h“: ch, ... sh + u. Ligoj, sed ekde 2023 ĉefe la ĉapelitajn literojn.

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE): www.verduloj.org, novaj artikoloj je la enirpaĝo, aliaj sub "Dokumentoj"

Homaj Rajtoj (1947): eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Rajtoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/

Tutmondaj Mondcivitanaĵ Teritorioj: www.recim.org/dem/tcm-list.htm

Rajto de memdetermino: eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino

--omaj Respondecoj (1997):

eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Respondecoj

la dokumento en la angla, kiu ligas al tradukoj en ch. 40 lingvoj:

www.interactioncouncil.org/publications/universal-declaration-human-responsibilities

Internaciaj Tagoj:

27a de Januaro: Holokaŭsta Tago

3a de Majo Monda Tago de Gazetara Libereco

26-a de Julio estas la Tago de Mangrovoj & de Esperanto

= = =

= =

2024-04-14 Vizito de la Kanceliero de Germanio, Scholz, en Ĉinio - komentoj de MEP

Reinhard Bütikofer, Membro de la Eŭropa Parlamento, komentis detale kion li atendas de tiu vizito. Ekzemple li proponis inviti politikiston ekzemple el Francio kaj/aŭ Pollando por montri ke Germanio estas parto de EU.

Laŭ li 5 ĉefaj temoj devus ludi gravan rolon dum la venonta vojaĝo de la kanceliero de Germanio al Ĉinio.

1. La amasa materiala subteno de Ĉinio al la imperiisma agreso de Rusio en Ukrainio.
2. Ĉikanaj regularoj de Ĉinio pri eksterlandaj investoj, kiuj celas prezenti al ili la alternativon aŭ servi la politikajn ambiciojn de la Komunista Partio aŭ rezigni fidindan lokan sekurecon.
3. La sistema politiko de Ĉinio eksporti tre subvenciitajn industriajn trokapablojn, kiuj, se ni ne rezistas, minacas Eŭropon per danĝera malindustriiĝo.
4. La ĉiam pli agresema politiko de Ĉinio subfosi la stabilecon kaj la status quo en la Tajvana Markolo kaj en la Sudĉina Maro.

5. La draste kreskanta severecco de Ĉinio en la subpremado de la memdeterminado de la civila socio, de la politika diverseco de opinioj aŭ de la defendo de bazaj homaj rajtoj, kiel estas precipe la kazo de la ujuguroj, tibetanoj kaj hongkong-anoj.

- - -

2024-04-10 Milito en Ukrainio - ĉu senperforte sindefendi eblus

Intertempe Putin mem parolas pri milito - de Ukrainio kontraŭ Rusio, laŭ sia opinio.

En Torino mi aĉetis la verdan libron „Teknikoj de neperforto“ de Aldo Capitini, eldonita 2011 de Edistudio/NITOBĒ.

Ĝi estas bone farita, tre amplekse raportas pri diversaj historiaj neperfortaj agadoj. Mi ĉiam havis ĉi-tiun militon en mia kapo, kiam mi legadis. Aparte pri la senperfortaj agadoj kontraŭ la brita kolonia okupacio kiujn organizis Mahatma Gandhi kun la hinda popolo. Tio iomete estis komparebla kun la milito de Putin kontraŭ Ukrainio, li kvazaŭ volas havi tiun teron kiel kolonio.

Ĉar la kontraŭagoj kontraŭ la koloniistoj parte okazis perforte* la brita generalo Dyer - en Amritsar 1919-04-19 - ordonis pafi en la amason da homoj, mortpafitaj estis 379, pli ol 1000 estis vunditaj, inkluzive de infanoj.

Gandhi komprenis ke necesas spirita pritrakto de la afero. Necesas bona preparo de tiuj homoj kiuj partoprenas je agadoj, ke ili konduku malperforte, eĉ se la reĝimo mortigus protestantojn. Pli poste kelkaj el liaj - malfacilaj agadoj - estis tute pacemaj, uzante publikan malobeemon: ekzemple kontraŭ la malpermeso mem produkti salon el la maro, kaj memfaritajn ŝtofojn, ĉar la britoj volis vendi la britajn produktojn.

Je la antaŭlasta paĝo (180) en tiu libro estis la respondo kiun mi serĉis - temis pri „ebla agado neperforta kontraŭ la Hitlera reĝimo“ - kiun mi komparetas pri la nuna krima milito de Putin.

Gandhi respondis: „ ... oni estus devinta ne ŝanĝi la metodon, sed kreskigi la sinoferon, ĉiam je la fido, ke la konscienco de la adversuloj povos sin malfermi al la konscio pri la propraj krimoj.“

En tiu libro estas ankaŭ la raporto kiel granda parto de la popolo en Norvegio agadis kontraŭ la nazia armeo de Hitler, ili klopodis ne kunlabori (ktp.) , feliĉe la nazia perforto finiĝis 1945.

*) tiu informo venas el vikipedio.

- - -

2024-04 Rusia tergaso por Ĉinio

Proksime de Blagoveŝĉensk je la limo al Ĉinio vivas homoj kiuj ankoraŭ hejtas per ligno. La gaso-dukto ne portas gason al la idilia vilaĝo, sed al Ĉinio. Iu virino rakontas pri la multaj mortigitaj politikaj malliberuloj - de la Stalia epoko.

Ankaŭ interesa por vidi la pejzaĝojn kaj kiel homoj vivas tie.

Kaj jam pluraj tomboj de junaj soldatoj kiuj estis senditaj al la milito kontraŭ Ukrainio.

Raportoj de rusaj ĵurnalistoj; 24 minutoj, en 6 lingvoj, videbla ĝis 2026-10-24.

<https://www.arte.tv/de/videos/116586-000-A/rusland-gas-fuer-china/>

- - -

2024-04 Opozio en Rusio

En ĉiu demokrata ŝtato ekzistas opozicio. Eĉ en Rusio, sed tie vera opozicio batalas

kontraŭ ledaj muroj.

Post la kaŭzita de la reĝimo morto de Navalnij montriĝis ke multaj homoj funebris, kaj multaj venis al elekto-loko je tagmezo - kompreneble hazarde, ĉar alimaniere tio estus krimo.

Unu el la tri akceptitaj de la reĝimo alternativaj kandidatoj, Davankov, ricevis relative multaj voĉoj.

Jekaterina Dunzova kaj .. Nadeshdin

koncize, 12 minutoj, en 6 EU-lingvoj

<https://www.arte.tv/de/videos/118759-000-A/rusland-putins-leise-gegnerin/>

- - -

2024-04 Doku pri la vivo en Rusio dum milita tempo

Estis ĉefe intervjuoj kun homoj en Rusio, de Kaŭkazo ĝis Karelio, en Moskvo, kaj en pluraj siberiaj lokoj ĝis Ulan Ude, kiujn la svisa ĵurnalisto parte konas delonge.

(ca. 1 h, en la germana):

<https://www.3sat.de/gesellschaft/politik-und-gesellschaft/weiterleben-in-putins-rusland-100.html>

Pri tiu dokumentado okazis koncizigita versio en la rusa televido - sed ili raportis nur la pozitivajn por la politiko de Putin eldirojn. Nu, jen - faŝisma reĝimo ne emas prezenti aliajn opiniojn.

= =

2024-04-03 Prezidenta-elekto en Usono - malfacile

la sistemo elekti prezidenton en Usono estas malfacile komprenebla por mi. Ankaŭ la rolo de elekto-rezultoj de t.n. „Elekto-viroj“ ene de la unuopaj federaciaj ŝtatoj, kiuj decidis, eĉ se en tuta Usono la nombro montras alian bildon.

Preskaŭ ĉiam gajnas kandidato el unu de la du grandaj partioj. En la lastaj jardekoj ofte okazis ke tria kandidato de malgranda partio (viro au virino) decidis la elekton.

En 2000 G.W. Bush venkis super Al Gore ĉar Ralph Nader, la kandidato de la Verda Partio, ricevis 97.421 voĉojn en Florido (simile en Oregon kaj N.H.). Bush venkis tie kun pluso da 537 voĉoj, kaj tio decidis lian tutan venkon. Malgraŭ tio, ke la voĉoj de tuta Usono klare estis por Al Gore, Bush venkis. (Necesus pli detala rakonto, sed tio ne necesas ĉi tie).

Ni konas la rezulton: militado en Irako kaj Afganio.

Nader estis jam konata tutmonde ĉar li defendis la rajtojn de konsumantoj en Usono.

Al Gore antaŭe estis vic-prezidento, i.a. li agadis por naturprotekto kaj verkis libron „An inconvenient truth“ (pri la jam komencinta klimato-krizo).

Ankaŭ 2016, denove la kandidato de la Verda Partio, Jill Stein, ricevis multajn voĉojn en kelkaj ŝtatoj - tiuj voĉoj finfine decidis ke Trum iĝis prezidento.

Jill estas kuracistino kaj agadas laŭ la programo de la Verda Partio - bone.

Nun en 2024 Jill Stein denove kandidatas, krome Robert Kennedy kaj Cornel West.

(informoj plejparte lau B. Pickert en taz, 2024-03-30, p.10)

Komento de AVE/mw: ni (la Verdaj Partioj) kritikas tiun strangan elekto-sistemon el alia epoko. Tamen dum regas tiu elekto-sistemo en Usono oni devas pli profunde taksi, kio povas okazi. Mi kaj aliaj en la Verda Partio de Germanio opinias, ke bonas aktivi kie oni povas havi valorajn rezultojn: en lokaj konsilioj kaj en la parlamento. Sed ĉifoje temas pri Trump aŭ Biden.

- - -

2024-03 Informada milito de la 21a jarcento

Jen kelkaj terminoj kiuj difinas la diversajn gradojn da falsa aŭ malĝusta informo pere de disvastigo ene de t.n. Socialaj Retoj:

Des-informo: malveraj asertoj - por manipuli la homojn;

Malĝusta informo: pro malbona kontrolo de ricevitaj informoj;

Mal-informo: intence publikigita informo - ekzemple el alia tempo - por pruvi ion kolektivan en nuntempo. Ekzemple: rusiaj troloj montras foton aŭ videon de la Asov-regimenton kies batalantoj portas naziajn simbolojn. Tial Putin ĉiam parolas pri „la nazioj en Ukrainio“ - fakte en Ukrainio la nazia kulturo estas marĝena afero.

Mola Propagando: rusiaj diplomatoj neas subpremojn en la propra lando (ekz-e al tataroj sur Krimeo), kaj neas la suverenecon de la post-sovetiaj ŝtatoj.

Medio-monopoloj de enlandaj gazetoj kaj televido-stacioj: tiel aliaj informoj ne atingas la popolon.

Finfine barado kontraŭ interretaj informoj el eksterlando.

Ek de 2013 informo-kuirejoj (troloj) sub kontrolo de sekretaj servoj distribuas tiajn malveraĵojn en la tutan mondon. Ili ankaŭ sukcesas enpenetri en retojn de aliaj registaroj aŭ de parlamentoj, unuflanke por ekscii kion ili diskutas. Aliflanke por ĝeni ilin. Ekzemple la Instituto por Interreta Esplorado de Prigoshin en St. Peterburgo, kun filioj en pluraj metropoloj de la mondo.

Jen konciza informo dum 12 minutoj, en 6 lingvoj (parte subtitolita).

<https://www.arte.tv/en/videos/114573-003-A/mapping-the-world/>

kaj jen nur en la germana

pri la 5 trolo-firmaoj de Putin (1 horo; ĝis 2026-02-21):

<https://www.ardmediathek.de/film/putins-baeren-oder-doku-ueber-hacker/Y3JpZDovL3N3ci5kZS9zZGlv3RJC8xNTg4>

- - -

2024-04-16 Pri aŭtonomia regiono de P.R.Ĉinio - Ekologio en Tibeto

Kaj jen estas dokumenta filmo (85 minutoj, rekta elsendaĵo je la 16a de Aprilo, kaj en la Mediateko ĝis la 3a de Aprilo, en la franca kaj germana lingvoj) pri la historia evoluo de la rilatoj inter Han-Ĉinio kaj Tibeto ĝis la nuna tempo.

Eĉ se vi jam multon scias pri Tibeto, certe indas spekti la lastajn 15 minutojn, kiam temas pri diversaj resursoj, pro kio Ĉinio okupis ĝin kaj nun ne volas liberigi.

Kelkaj certe scias ke Mao Tse Dong okupigis Tibeton ek de 1949.

Pro malrespekto de la Tibeta Kulturo, aparte koncerne al la Dalai Lamao, resurektis tibetanoj en 1959-03-10 ĝis la 21a de Marto - pluraj dek-miloj da tibetanoj mortis. Li fuĝis al Hindio.

Malgraŭ la nomo „Autonoma Provinco“, fakte temis pri kolonia okupacio kaj kultura genocido. La saĝa - nun maljuna - Dalai Lamao evoluis vojon por supervivi ĉi-tiun danĝeran situacion. Li diras: batali per armiloj kontraŭas la budhismajn instruojn, kaj ne gvidos al bona fino. Li esperas ke iam lia popolo havos sian kompletan kulturen aŭtonomion. Gravas vivteni la religian kulturon de senperforteco - kio almenaŭ eblas en la hindia ekzilo.

Kune kun Christian Lavarenne mi verkis artikolon pri ekologia temo, ĉar en la 80-aj jaroj temis pri forhakado de multaj arbaroj en Tibeto, kaj vendo de la ligno, flanke de la ĉina registaro. Ĝi estis tradukita en la ĉinan (eble mem de Prof-o Sheng Chenru ?), kiu publikigis ĝin en la scienca dulingva ĉina revuo „Tutmondaj Sciencoj kaj Tekniko“ 1996/3 (- jen la ligilo al tiu artikolo:

<http://www.verduloj.org/tibeto.htm> > de tie al: Senarbarigo en Tibeto

En la nuna epoko plej gravas trinkakvo (kiu ankaŭ dependas de arbaroj), energio kaj kemiaj elementoj kiel litio kaj tiuj kiujn oni bezonas por produkti bateriojn kaj ĉipsojn por nia elektronika epoko, kiu nun volas havi elektrajn aŭtomobilojn, i.a. por malpli damaĝi al la klimato.

<https://www.arte.tv/de/videos/111739-000-A/tibet-china-das-stille-verschwinden/>

(atentu: videbla supozeble nur en Francio kaj Germanio - sed eble ne en aliaj landoj - tion mi nun eksciis de Arte.tv)

= =

2024-03-17 La prezidento en Rusio restos la sama, supozeble ĝis sia vivofino.

Oni elektis, sed elekto estis mallarĝa. Putin kaj tri aliaj, kiuj ne tro ĝenis lin. La aliaj kandidatoj aŭ estis malliberigitaj kaj murditaj. Kaj unu lasta kiu ankoraŭ estas libera, kolektis la bezonatan nombron da subskriboj - ricevis la respondon ke ne sufiĉas; "ili" trovis sufiĉe multajn erarojn (ĉu sendependa organizo subkontrolis ? - supozeble ne).

Sed Navalnij antaŭe konsilis ke tamen eblas montri la nekonsenton.

Tute hazarde alveni je tagmezo de la lasta tago de tiuj elektoj - tion faris miloj en pluraj urboj, ne nur en Rusio, ankaŭ en eksterlando, fakte mi nur aŭdis de manifestaciantoj ke tio okazis je la konsulejo en Bonn/Germanio.

Eĉ bone estus elekti la unuan de la opoziciuloj, se oni ne konsentus.

Do, en la sola konsulejo en Germanio, Bonn (elekto-loko N-ro 3822) voĉdonis 5071 civitanoj:

Vlad. Putin ricevis 75% - Vlad. Davankov – 22,8 %

Bedaŭrinde pri Berlino (3815) mi ne trovis la nombrojn., ankaŭ ne vizitante la ambasadejon: Germany.mid.ru

Dank' al Nowaya Gazeta (nun en ekzilo, ĉar enlande ne plu sufiĉas la aero por diri aŭ skribi kritikajn vortojn), venis listo de multaj eksterlandaj urboj kun la rezultoj: Jen

<https://novayagazeta.eu/articles/2024/03/22/foreign-insurgency-en>

La ĉefa rezulta pri la eksterlandaj voĉdoni estis ke en 50% de tiuj (ĉ. 30) urboj tutmonde la alia kandidato ricevis pli da voĉoj ol la eterna prezidento.

Do, mi esperis ke post tiu plen-sukcesa elekto V.V. Putin povas regi pli trankvile.

2024-03-25 Terroristoj en Rok-koncerto en Krasnogorsk apud Moskvo

Sed la diablo* nur kaŝis sin, kaj sendis grupon da islamistoj kiuj kreis grandan civilan katastrofon

en rok-koncerto en Crocus en la antaŭurbo de Moskvo. Kondolencaj mesaĝoj venis de multaj registaroj, ankaŭ de Germanio. La Usona sekreta servo informis ke ili sendis mesaĝon al iliaj rusiaj kolegoj pri tia minaco, kelkajn tagojn antaŭe.

Putin eĉ ne menciis, ke ISPK (islamistoj kun ligo al Afghanio) asertis ke ili faris la atencon.

Putin ne tuj komentis; eble li atendis ĝis oni trovis aŭtomobilon de eblaj atencantojn proksime de Briansk, do, proksime de Ukrainio. Sed de tie oni ankaŭ povas daŭrigi al la sudaj islamaj provincoj.

Nur tiam li rakontis, kaj tiel sin-esprimis, ke ili plej verŝajne havis rilaton al Ukrainio, kaj "malferman fenestron" por enveturi en Ukrainion. Tio signifis, ke fakte temis pri atenco de Ukrainio kontraŭ rusaj civiluloj. Li ne prezentis pruvajn.

*) diablo en Moskvo ludas rolon en "La Majstro kaj Margarita" de M. Bulgakov.

Vi povas kompari tion kun Beslan 2004, tie mortis pli ol 300 (de 1100 ostaĝoj) - pri tio okazis multaj kritikaj demandoj. Kial oni venenigis en la aviadilon la rusan ĵurnalistinon Anna Politkovskaja, kiu alflugis por raporti. Ĉu kelkaj ostaĝoj estis mortpafitaj de la soldatoj aŭ de la islamistoj. ktp. Oni ne esploris la korpojn. Kial ili pafis per tanko - la rompita tegmento mortigis kaj vundigis multajn ostaĝojn. Evidente malpli gravis la vivo de la ostaĝoj (infanoj kaj gepatroj de nord-Osetio / Kaŭkazo)

Komence la oficiale informita kvanto da ostaĝoj estis nur ĉ. 10-ono de la reala nombro.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Terrorisma_atako_en_Beslano

Fakte: post Beslan V. Putin akiris la gazetaran kontrolon kaj decidis malpermesojn. Plia paŝo al faŝisma reĝimo.

= =

2024-03-20 Irina Ŝerbakova - intervjuo en la ekzilo

Jam pli longan tempon Memorial laboris sub la ordonita titolo „eksterlanda agento“.

Ĝus antaŭ la komenco de la milito kontraŭ Ukrainio - en Februaro 2022 - ŝi devis forlasi Rusion, ĉar estis en danĝero esti malliberigita. En la sama jaro memoriala ricevis la Nobel-Premion por Paco.

Ŝi naskiĝis en Moskvo, familio parte venis el Ukrainio. Studis germanistikon. Kune kun Andrej Saĥarov kaj Lev A. Ponomarjov ŝi fondis Memorial en 1989 por esplori kio estis la vereco en la historio de Rusio - Homoj Rajtoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/113608-000-A/irina-scherbakowa-russlands-unbequemegewissen/>

(dokumenta filmo, 52 minutoj, en la franca kaj germana)

Parte dokumentaj videoj el pli fruaj tempoj, intervjuo post ŝia ekzilo en Israelo kaj Berlino, kie ŝi nun vivas - proksime al ŝia hejmlando Rusio.

--

Dokumenta video pri la historio de Krimeo.

12 minutoj, en 6 lingvoj (de, en, es, fr, it, pl)

<https://www.arte.tv/de/videos/114573-015-A/mit-offenen-karten/>

Arĥipel Gulag publikigita antaŭ 70 jaroj.

kiel Aleksander Solŝenicin sukcesis priskribi la gulagan sistemon de Stalino.

<https://www.arte.tv/de/videos/112855-000-A/der-archipel-gulag-ein-buch-mit-folgen/>

= =

1945-01-27 Rememori al la internacia Tago de Holokaŭsto

Tiu historio apartenas al la fono, kial la judoj tiom strebas loĝi en Israelo.

Bedaŭrinde ili ne sukcesis konvinki la palestenanojn translokiĝi - Se tiuj volas resti, ili devas fondi funkciantan ŝtaton, kiu sukcesas garanti la sekurecon de la nunaj limoj - por eviti la terorismen de Hamas.

Eble vi scias ke mi volus havi straton en germana urbo, kiu portas la nomon de Lidia Zamenhof.

Baha'anoj kaj liberala juda komunumo en Freiburg subtenis nian proponon (de la Esperanto-grupo, al la urba komisiono), sed ili ne interesiĝis - ni ja ofertis prezenton.

Eble mi havos ŝancon en Bonn aŭ Kolonjo (ĉar tie 1933 okazis UK, sed Lidia povis partopreni nur per letero al la bahaa kunveno).

- - -

2024-02 Krimeo - formale apartenas al Ukrainio

raporto pri (plejparte) tataraj libervoluloj - kiuj volas rehavi la Krimeon por Ukrainio.

Ambau filmoj en 6 lingvoj:

<https://www.arte.tv/de/videos/118073-000-A/ukraine-der-traum-von-der-krim/>

kaj jen detaloj pri la historio de Krimeo, inkluzive de statistikaj nombroj:

2001 vivis sur Krimeo: rusoj 5%, ukraineoj 24%, tataroj 12%

Pro la plimulto de rusoj Ukrainio akceptis aŭtonomian statuson de Krimeo.

Sub la reĝimo de Rusio ekde 2014 la buĝeto venis je 70% de Rusio.

Ili raportis ke tie estas pluraj lagroj kie ukrainaj infanoj loĝas kiuj estis fortransportitaj de la okupitaj terenoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/114573-015-A/mit-offenen-karten/>

= =

2024-02-27 Petrovskaja, . . . , Nemcov, Nawalny, Orlov (li ankoraŭ vivas)

Oleg Orlov, kun-respondeculo de la malpermesita NRO Memorial, kiu ricevis la Nobel-premion, estis punita al 2,5 jaroj en malliberejo. Sub tia reĝimo estas honoro esti punita. Bedaŭrinde danĝera honoro. Al ili kaj la aliaj restos la memoro viva.

Ankaŭ en Bonn estis kelkaj floroj por Nawalny, kaj inter kelkaj tekstoj: inter ili tio kion li montris kiam li estis punita al sia la lasta gulago: la komunisma slogano „Unu por ĉiuj , ĉiuj por unu“. Mi legis ke li estis punita en Kovrov - kie mi estis 2004 la lastan fojon en Rusio, je la IJK.

= =

2024 Ĉu Ukrainio havas historion ?

laŭ Putin prefere ne, tial li klopodas destrui ĉion (homoj kun siaj genoj, ŝtelas infanojn,

detruas lernejoj, teatroj, libroj, la ukrainian lingvon) kio montras la ukrainan kulturon.

Sed jes, longa historio komune antaŭ mil jaroj en Kievo.

Sed tio jam finis kiam Litovio kaj Pollando regis en tiu granda regiono kiu etendiĝis ĝis Charkiv. Ekzistas multaj libroj: jen foton kun ekzemploj.

Indas spekti 2 horan video-dokumenton kun kelkaj historiistoj pri la historio de Ukrainio (ĝis Aŭgusto) en la: franca, germana, angla, hispana kaj itala, sed ĉi-foje ne en la pola - kial ?

Interesa detalo estas mapo el la 17a jc., pri kio Putin diris ke la vorto Ukrainio ne troviĝas tie - sed fakte estas alie: mankas la vorto Rusio.

<https://www.arte.tv/de/videos/115525-000-A/blackbox-ukraine-kampf-um-die-geschichte/>

La komenca foto montras Lessja Ukrainka, poetino kiu verkis en la ukraina lingvo.

- - -

2024-02 Akcidentoj kune kun aromarmiloj

Jen retejo kiu listigas la malgrandajn kaj grandajn akcidentoj kiuj okazis kiam britoj aŭ usonanoj testis la sistemojn.

Kelkaj el tiuj akcidentoj povintus okazigi katastrofon:

Informo en la germana.

<https://www.mitwelt.org/broken-arrow-atomwaffen-unfaelle-katastrophen>

Jen en la angla la diversaj realaj okazaĵoj kun aŭ pri atombomboj:

https://www.icanw.org/nuclear_weapons_history

Kaj jen ekzempla dokumenta video en la franca kaj germana.: (videbla ĝis 2025)

<https://www.arte.tv/de/videos/093660-000-A/der-beinahe-gau-von-arkansas>

= =

2024-02-11 Subteni Ukrainon estas devo de eŭropaj ŝtatoj

Nia plej granda aktuala sekureco-problemo en Eŭropo - la agreso de Putin kontraŭ Ukrainio !

Reinhard Buetikofer komentis la viziton de la germana kanceliero en Usono. Se Usono sub la influo de Trump retiriĝos el la subteno de Ukrainio, la liberaj eŭropaj ŝtatoj devas pli forte subteni Ukrainon. Ĉi-kaze Estonio, la plej rekta najbaro de Rusio, elspezas 0,25% de la Malneta Landa Produktaĵo por subteni Ukrainon. Germanio (jam/nur 0,1%) devus sekvi tion kaj influi la aliajn EU-membrojn. (vidu la ret-ligilojn)

Al demando de usona dekstra ĵurnalisto al Putin, okaze de 2 hora interparolado, ĉu li intencas ataki Pollandon; Putin respondis ke li ne havas tiun intencon. Bone ? Ne, ĉar li mensogas laŭ-bezone. Li ja iam plendis ke - laŭ lia opinio - la disfalo de SU estis la plej granda katastrofo de la 20a jc..

<https://de.wikipedia.org/wiki/Euromaidan>

<https://www.tagesschau.de/newsticker/liveblog-ukraine-sonntag-392.html>

<https://www.deutschlandfunk.de/scholz-besuch-in-den-usa-interview-reinhard-buetikofer-gruene-eu-aussenpolitik-dlf-95edf666-100.html>

= =

2024-01 EU-Imposton por tre-riĉuloj - kolektado ĝis Oktobro

Mi ne kontraŭas personan riĉecon, ĝi ankaŭ ofertas iomete da sekureco, ebligas helpi libere al amiko aŭ samideano; tamen montriĝis laŭ statistiko, ke en la tuta mondo la pli- kaj plej-riĉuloj sukcesas plivalorigi siajn posedaĵojn. Kaj kontraste al tio la plej malriĉaj homoj

malgajnis.

Ili/ni ne volas distribui la havaĵojn de la plej-riĉuloj, sed ili povas kaj devus pagi ĉiujare etan procentaĵon al komuna kaso - ĉi-kaze temas pri EU.

En la FAQ (demandilo) estas ekzemplo pri Belgio: valoro de homo (familio) kiu valoras pli ol 1,25 milionoj da Euro, adicie al la valoro de 1 propra domo/loĝejo kaj valoro de ilia profesia firmao/entrepreno.

La kolektado daŭras ĝis Oktobro, tamen, bonvolu tuj akcepti se vi konsentas, por ne forgesi vian partoprenon. La kondiĉoj por sukceso estas ke

En minimume 7 EU-landoj subskribas minimume iu speciala kvanto (ekzemple en Estonio aŭ Luksemburgo pli ol 4.000 da subskriboj, en Germanio 68.000 en Francio

Kompreneble validus simila tutmonda imposto por financi la agadon de UN-asocioj. Sed tion oni ĝis nun ne povas realece postuli.

Pli da informoj: <https://www.tax-the-rich.eu/>

kaj jen rekte al la Civitana Iniciativo por EU - do, nur por civitanoj de EU-landoj:

https://citizens-initiative.europa.eu/initiatives/details/2023/000006_de

Saluton, mi petas vin subteni la alvokon.

Amike, Peter Weide - al kiu mi tre dankas :)

- - -

2024-01-14 rusa poeto Lev Rubinstein mortis

Lastan dimanĉon, rusa poeto Lev Rubinstein mortis en la aĝo de 76 jaroj. Li estis trafita de aŭto semajnon antaŭe, kaj finfine nun mortis. Rubinstein kritikis la Kremlon ekde la fruaj 2000-aj jaroj. La 25-an de Februaro 2022, li skribis pri la granda rusa atako kontraŭ Ukrainio, kiun oni ne rajtas nomi "milito" en Rusio: "Sed ĝi estas vere vera milito. Kaj ĝi nepre devas esti ĉesigata. Kiel? Iel, sed nepre. Kaj ni certe devas pensi pri tio, ni ĉiuj kune, kaj ĉiu individue."

(fonto: dekodeo.org)

Komento de AVE/mw: Oni povas demandi ĉu tiu akcidento estis normala , ĉu intenca ?

- - -

2024-01 PR Ĉinio subpremas minoritatojn -

Sub la regado de prezidento Xi aparte la etnoj de Ujguroj kaj Tibetoj estas sub premado. La ŝtato edukas la infanojn for de ilia kulturo. Ili ne havas la eblecon lerni sian etnan lingvon. En kazo de Tibeto la budhismo estas transformita al ĉina ŝtata budhismo. Ambaŭ temoj rilatas al la homoj rajtoj: popra lingvo kaj religio - sed ne en PR Ĉinio - bedaŭrinde.

En Februaro 2023 aperis raporto de specialaj raportistoj de UN-Konsilio pri Homaj Rajtoj, kiu alarmis ke pli ol 1 miliono da tibetaj infanoj estas edukataj en devigaj internatoj !

Ĉiujare je la 10a de Marto oni (en multaj urboj la urbodomoj) montras la tibetan flagon kiel rememori al la popola resurekto por protesti kontraŭ la akaparo de Tibeto antaŭ 10 jaroj kaj malhelpi la malliberigon de la Dalai Lamao en 1959. Poste okazis pluraj manifestacioj, feliĉe li povis fuĝi al la ekzilo en Hindio. Sed sekve de tio (inter Marto 1959 kaj Septembro 1960) ĉinaj soldatoj mortigis ĉ. 80.000 da tibetanoj kaj 25.000 estis malliberigitaj (sen informoj kie kaj kiom longe).

.Jen la fonto-indiko - en la germana lingvo:

<https://www.tibet-initiative.de/besetzung-tibets-keine-interne-angelegenheit-pekings/>

Dankon al Prof-o Sheng Chengru kiu tradukis la raporton el Esperanto en la ĉinan kaj publikigis ambaŭ : pri la katastrofa senarbarigo de Tibeto jam de 1978 (aŭ eble pli frue) flanke de PR Ĉinio, kio kaŭzas ankaŭ nun grandajn eroziojn.

Ni savu la tibetan praarbaron kaj la aziajn riveregojn !

El: Tutmondaj Scienco kaj Tekniko, 1996/3, p-oj 30 - 34 (cn, eo)

legebla en Esperanto: http://www.verduloj.org/tib_senarba.htm

kaj en la ĉina lingvo: http://www.verduloj.org/tib_senarba_cn.htm

Mi legis nun, ke ek de 2013 PR Ĉinio komencis rearbarigi la regionon; estus bone se ili klopodas replanti tiel ke plej eble natura arbaro rezultiĝos. Mi vidis tian replantadon proksime de la Ĉina Muro, vojaĝante de Ulan Batoor al Pekino, 2004, sed tio aspektis tre monotona. Jen informo pri rearbarigo de la Ĉina Radio en Esperanto:

<https://esperanto.cri.cn/Current-affairs/viewpoint/4188/20211014/706629.html>

La ekzil-registaro 2011 eldonis raporton pri la natura medio de Tibeto, kompare kun iamaj tempoj kaj pri la akvo-ellaso el glaĉeroj kiuj nutras nordan kaj sudan PR Ĉinion, Hindion kaj la pli orientajn landojn.

<https://tibet.net/press-kit-on-tibets-environment-and-development-issues/>

- - -

2024-01-02 Japanio - fino de totala pacifismo ?

La longa pacifisma tempo post 1945 finiĝas. Dum tiu tempo Japanio estis protektita de Usono; sed intertempe Japanio pagas grandan parton de la militaraj kostoj de Usono en tiu regiono. Ankaŭ kunlaboras en agadoj de UN. Sed rezignis pri propra armeo.

Komenciĝis malpacaj okazaĵoj. Ekzemple flanke de Norda Koreio, kiu testadas atomrakedojn kiuj flugas en la direkton de Japanio, kaj eĉ super la insulo.

Eble pli grava danĝero prezentas la granda najbaro PR Ĉinio. Senkaku insuloj estas administrataj de Japanio, sed nun PR Ĉinio postulas posedi ilin. Temas pri granda mara areo ĉirkaŭ tiu insularo.

La insula ĉeno de Okinawa estas la limo inter Ĉinio kaj Japanio; ĝi direktiĝas al Taivano, kaj de tie al Indonezio.

Nur post la agreso de Putina Rusio kontraŭ Ukrainio, la japana registaro vidas la riskon ke granda najbaro povas ataki, se mankas defendo-forto. Tial nun mem investas en armeon. Eĉ kun Suda Koreio komenciĝas amikeca kunlaboro. La celo estas montri al Ĉinio la limojn.

Dokumenta filmo en 6 lingvoj (de, en, es, fr, pl, it), 53 minutoj, videbla ĝis 2024-02-05:

<https://www.arte.tv/de/videos/113626-000-A/japan-ende-des-pazifismus/>

- - -

2023-12 Peticio al 9 registaroj akcepti kaj subskribi la Traktaton aboli atombombojn

<https://www.thepetitionsite.com/de/416/121/217/?z00m=33298885&redirectID=3374053318>

== =

Korekto al la lasta AVENO pri Ukrainio:

de Christian Lavarenne, kiu prave skribis:

„Laŭ la filmeto mem la libroj estas kolektataj por ilia **detruo** : Nek "por iam redoni al Rusio" nek por bruligi ilin sed por ke, farante el ili paperpaston, presistoj povu eldoni novajn librojn, en la ukraina, por la ukrainaj soldatoj.* Tio estas pli eleganta kaj *natur*protektata ja ol " libroaŭtodafeoj " , sed tamen tre similas : la homoj nur ŝparas monon kaj produkton de CO2.“

Mi skribis - evidente preteraŭdis la vorton „reciklas“ - kaj aldonis laŭ mia espero.

" Ruslingvaj libroj **oni kolektas, por iam redoni al Rusio**, aŭ eble por atendi al pli paca

konduto de la orienta najbara registaro ? "

Se vi bone sekvas la filmeton, ankaŭ homoj kiuj kutime uzis la rusan lingvon, ne plu volas uzi la lingvon de la agresinto.

Komento de AVE/mw: mi retenas miajn ruslingvajn librojn. Mi parolas (laŭ miaj etaj eblecoj) kun rusoj en la rusa, ankaŭ kun ukrainanoj.

La rusa lingvo ne kulpas pri tiu milito.

Ekzistas bona poemo „мужество“ de Anna Achmatova pri la „rusa parolo/lingvo“ - okaze de la sieĝo - dum 900 tagoj - de Leningrado.

Tiu sieĝo de Leningrado flanke de la nazia Germana Imperio estis multe pli grava ol la milito de Rusio kontraŭ Ukrainio - multaj homoj malsatmortis, tamen ĝi similas en la daŭro (jam 22 monatoj), kaj parte al la intenco. La diferenco estas ke per nuntempaj iloj eblas pli bone detruiri alflugantajn dronojn aŭ rakedojn. Subteni la defendon estas la plej grava helpo de okcidentaj landoj.

- - -

La plej koncizan komenton sendis Miko Sloper:

„Mi esperas ke la venonta reprezentanto apogas pacon anstataŭ "venkon" perfortan.“

Mia komento: Dankon Miko:, mi esperas trovi posteulon por la sekretario de AVE kiu kaj apogas pacon kaj klare vidas kiu estas la ĉefa agresulo*

, kaj subtenas la agresitan popolon. Ni ne volas venkon - nur la restitucion de Ukrainio en la limoj de 1994. Nur volas finon de tiu milito.

*) tro ofte estis Usono kaj la sekreta servo CIA kiu agredis por defendi siajn interesojn; sed ĉifoje estas sekret-servulo Putin, kiu diras ke li volas defendi la „rusia mondo“ „Русский мир«. Tio signifas, ke li ankaŭ agredus Estonion kaj Latvion, se li vidus ŝancon, ĉar tie vivas multaj ruslingvanoj.

- - -

Ligita kun la komentoj de Christian venis interveno de Denis-Serge Clopeau:

„dankon por tiu interesa filmeto.

mi taksas substrekinda kelkaj punktoj

a) la filmeto ligas politikan subtenon al sumetiĝo al lingvo fremda (unua tempe la rusa poste la angla)

b) la filmeto ŝajnas al mi erara pri la sinsekvo de eventoj. Ezemple kila ne memorigi la statuton de la ukraina lingvo dum sovetunia periodo ?

De kiam decidiĝis forviŝo de la rajtoj de ruslingvanoj en ukrainio ?

c) la junulinoj interviuitaj esprimas plenan fidon al EU kaj ĝia angla-lingvaĵo mi plendas iŝin pro venontaj konstatoj kaj elreviĝoj

Tiu filmeto do atestas pri kutimaj fortoj de naciismo: konstrui historian paroladon eĉ ekster la realaj eventoj, difino de popolo per ununura historio. Do ni ja konstatas ke la milito de Putin helpas la fundon de Ukraina naciismo, kiu venas tuj kun propono de fakta submetiĝo al Usono. (fakte je kosto de ĉiuj EU civitanoj kaj morto de pluraj centmiloj da junaj ukrainoj kaj rusoj, certe la plej malriĉaj, malalrangaj ktp)

Tiuj, kiuj volis atentigi la diplomatojn por rapide malfermi konferencon pri landlimoj en tiu orienta parto de la kontinento tute pravis. la amasmedioj kiel ARTE certe kontrolita de "Otanistoj" sukcesis malhelpi tiun pacan vojon samkiel la samaj fortoj sukcesis malhelpi realigadon de Oslo konsentaĵo por solvi Palestinan maljustaĵon

Mi atendas sen tro da espero ke niaj amasinformiloj bonvolu fari filmetojn pri la historiaj kialoj de la nunaj militoj ! ĉar eĉ libroj en la ukraina lingvo ja ne ŝirmos ukrainajn soldatojn tie la filmeto

tiklas frenezon

Ni bezonus klarigojn kaj malpli da ideologia kaĉo
Denis-Serge“

- - - kaj jen interveno de de Stano Belov:
li krome menciis ke devus esti „Ukrainio“

Mia komento: ankoraŭ mankas la decido de nia akademio - ĉu ne ? Se vi skribas Ukrainio, vi devus prononci Ukra'i'nio; sed la signifo de tiu lando ja signifas „U krajno“ - „je la rando“.

Sed Stano daŭrigis pli detale pri la lingvo-uzado - jen tio, kion li skribis:

„Iom da realo malantaŭ propagandaj fabeloj.

Ukrainio (ne Ukrainio!) ne "reduktis" la uzadon de la rusa, sed fakte tute malpermesis la publikan uzadon de ĉiuj minoritataj lingvoj per draka leĝo, pri kiu vi povas legi [ĉi tie](#). Imagu ke io simila estus endondukita en Belgio, Svislando aŭ Kanado. Kiom da tagoj post tio ekzistus tiuj ĉi landoj? Zelenskij en 2014 diris ke tiu lingva teroro estas stultaĵo kaj promesis likvidi ĝin - pro tio homoj voĉdonis por li. Jen video el 2014, en kiu li diras: "Se homoj en Krimeo kaj Orienta Ukrainio deziras paroli ruse, lasu ilin trankvile! Mi estas judo, mi parolas ruse, sed mi estas civitano de Ukrainio. La lingvo neniam dividos nin. Rusio kaj Ukrainio estas frataj popoloj! ktp ktp". Sed post akiri la prezidentan postenon li forgesis pri ĉiuj siaj promesoj kaj daŭrigis la persekutadon de la lingvaj, etnaj kaj religiaj minoritatoj kaj rifuzis plenumi la Minskajn interkonsentojn, subskribitajn en 2014-2015. Fine tio kaŭzis la nunan militon. Jen la morna realo malantaŭ CNN, BBC, DW kaj la aliaj cerbbolaviloj.“

Komento de AVE/mw:

Laŭ la germanlingva Vikipedio estis alia rakonto:

„Bereits kurz nach der Unterzeichnung der Vereinbarung traten russlandtreue Kämpfer sowie [russische Truppen](#)^[4] zum Sturm auf [Debalzewe](#) an und eroberten den Ort drei Tage nach der offiziell verkündeten Waffenruhe, womit das Abkommen bereits gebrochen war. Im weiteren Verlauf schwelte der Konflikt mit wechselnder Intensität weiter. Im Juni griffen die regierungsfeindlichen Truppen den Ort Marjinka westlich von Donezk an, im August 2015 kam es im Frontabschnitt von Mariupol zu einem schweren Angriff.^{[5][6][7]} Bis 21. Februar 2022 wurden keine neuen Gespräche eröffnet um diesen Konflikt international beizulegen

Am 21. Februar 2022 erklärte Präsident Putin, dass es für das Minsker Abkommen keine Aussichten mehr gebe.^[8] Am selben Tag verkündete und unterzeichnete Präsident Putin die Anerkennung der selbstproklamierten und international nicht anerkannten [Volksrepublik Lugansk](#) und der [Volksrepublik Donezk](#) als eigenständige Staaten und ordnete eine Entsendung von Truppen in die von Separatisten kontrollierten Gebiete an.^{[9][10]} Damit war das einzige von allen Seiten unterzeichnete Dokument zur Beilegung des Konfliktes hinfällig. „

Mi uzis Google por traduki tiun germanlingvan version:

"Baldaŭ post kiam la interkonsento estis subskribita, batalantoj lojalaj al Rusio kaj rusaj soldatoj^[4] sturmis Debalzewe kaj kaptis la lokon tri tagojn post la oficiale sciigita batalhalto, signifante ke la interkonsento jam estis rompita. Dum la konflikto progresis, ĝi daŭre boliĝis kun ŝanĝiĝanta intenseco. En junio, kontraŭregistaraj trupoj atakis la urbon Mariinka okcidente de Donecko, kaj en aŭgusto 2015 okazis grava atako en la Mariupol-sektoro de la fronto.^{[5][6][7]} Ĝis la 21-a de februaro 2022, neniuj novaj intertraktadoj estis malfermitaj por solvi ĉi tiun konflikton internacie. La 21-an de februaro 2022, prezidanto Putin deklaris, ke ne plu ekzistas perspektivo por la Minska Interkonsento.^[8] En la sama tago, prezidanto Putin anoncis kaj subskribis la agnoskon de la memproklamita kaj internacie neagnoskita Luganska Popola Respubliko kaj la Donecka Popola Respubliko kiel sendependaj ŝtatoj kaj ordonis la deplojon de soldatoj al separismaj areoj kontrolitaj.^{[9][10]} Tio signifis, ke la sola dokumento subskribita de ĉiuj flankoj por solvi la

konflikton ne plu validis. „

Kaj en la ruslingva Vikipedio pri Minsk II oni povas legi - tradukita de la germana traduko, ĉar la rekta traduko al Esperanto ne bone komprenis la aferon:

"La 18-an de februaro CMM La OSCE determinis ke la ukraina armeo pretas observi la interkonsentitan batalhaltan reĝimon, dum la formacioj de la ДHP kaj ЛHP rifuzas fari tion. La OSCE ankaŭ akuzis la DNR kaj LNR je limigado de la moviĝ-libereco de SMM-membroj en la konfliktzono [68][69][70]. „

Komento de AVE/mw:

tio estis nur unu el la okazaĵoj kiu montras ke Minsk II ne estis plenumita de la rusa flanko (inkluzive de la separatistoj en DNR kaj LNR).

La temon „la rolo de rusa lingvo en Ukrainio“ Putin povintus diskuti ĉe la Sekureca Konsilio de UN aŭ ĉe la Eŭropa Konsilio, kie ĝis 2014 Rusio estis plena membro. Jam post la akaparo de Krimeo flanke de Rusio, la Parlamenta Kunveno de la Eŭropa Konsilio abolis la voĉdon-raĵton de la rusaj delegitoj ...

Nur post la komenco de la nuna milito de Rusio kontraŭ Ukrainio Rusio ili entute abolis la membrecon de Rusio. Jen la informo en la angla Vikipedio, kiu similas al la germana; sed, kaj en la rusa kaj en Esperanto tiu temo estis ne sufiĉe detale montrita.

https://en.wikipedia.org/wiki/Council_of_Europe

Mi finas la temon - laŭ granda plimulto de la plena kunveno de UN la argumentado de Rusio por la t.n. „Speciala Militara Operacio“ laŭ Art. 51 de la UN -Ĉarto estis malakceptita. Fakte nun necesas helpi al Ukrainio regajni la plenan sendependecon de siaj limoj kiel garantiitaj de Rusio en 1994, okaze de la Memorando de Budapeŝto. Pri tio mi jam skribis plurfoje.

Mi esperas ke nia samideano Stano akceptas ke Putin havintus pli bonajn eblecojn - anstataŭ detruiri la najbaran landon inkluzive de multaj militkrimoj de la rusiaj soldatoj - subteni la rusan lingvon; ne nur en Ukrainio.

= =

2023-12-21 Kongo - riĉa & malriĉa lando - masakradoj, militoj - kaŝante murdistojn

Analiza kaj dokumenta filmo pri la militoj en Ruando kaj pli poste en DRK. Rifuĝintoj fuĝis en la najbaran DRK, Demokrata Respubliko de Kongo (iama Zaire). Okazis miloj da masakroj - de ruandaj soldatoj Forpeloj de tutaj vilaĝoj da rifuĝintoj devis fuĝi plurfoje. Poste re-transporto de la fuĝintoj reen al Ruando. AFDL ĉefo Kabila, k.a..

Mi ne tute komprenis ĉion. La celo estis aliro al la ercoj de t.n. raraj metaloj kaj al diamantoj. Ruando eksportas kion ili transportas el DRK.

La Dodd-Frank Act (Sect. 1502, pri konflikt-rilataj mineraloj) postulas informon pri la deveno de tiaj konflikt-mineraloj - laŭ ĉeno de liverado - por ne financi tiun militon en DR Kongo.**

Post la murdo je Kabila, lia filo transprenis la prezidenton. Kaj denove influo de Ruando. Laurent N'kunda fuĝas al Ruando. Li fondis M23 - la milico kiu ankoraŭ malstabiligas la gigantan landon. Finfine UN sendas soldatojn, MONUSCO. La franca gazeto „Le Monde“ publikigas informojn „pri la Mapping-Report“, oni organizas „Le Tribunal sur le Congo“. Denis Mukwege, kiu 2013 ricevis la Alternativan kaj 2018 la Paco-Premion laŭ Alfred Nobel, akuzas ke oni ne informas pri la nomoj de la ĉefaj kulpintoj. Ke tiu raporto restas kaŝita *.

2017 Usono kaj EU agadas laŭ tiu postulo. Sed la registaro en Kongo subtenas Kiungu (?), unu el tiuj kruelaj murdistoj. Poste la ŝtataj soldatoj amase murdis civilulojn en Kasai-provinco.

Monusco post 20 jaroj ne sukcesis pacigi la landon, ne povis protekti la homojn. Simile pkazis en posta Jugoslavio -

Eĉ ke kongaj soldatoj murdis 2 raportistojn de la UN Sekureca Konsilio (juna viro kaj virino el

Svedio kaj Usono) - kaj tio estis filmita - ne tre interesis la UN-Sekureco-Konsilion. Oni diris ke ne certas ke la registaro kun-kulpis. Evidente tiu konsilio sekvas politikon de mutado. Kaj la registaro de Kongo ne respektas la UN-on.

Preskaŭ neniu de la organizantoj de tiaj masakroj estis punita. Ili atingis pli altajn poziciojn. Sed nun la civiluloj manifestacias kaj gvidataj de Mukwege kaj aliaj postulas publikigon de la „Mapping-Report“ kaj ke oni punas la organizantojn de tiuj amasaj murdadoj.

*) raporto pri agado kontraŭ la Homaj Rajtoj en DR Kongo dum la jaroj inter 1993 - 2003:

<https://www.ohchr.org/en/countries/africa/2010-drc-mapping-report>

***) Pri la Dodd-Frank Act: https://de.wikipedia.org/wiki/Dodd%E2%80%93Frank_Act

Kaj jen la dokumenta filmo - inkluzivas multajn rekte filmitajn kruelecojn ! - pri tiu tuta afero: 110 minutoj, en 6 lingvoj (franca, germana, angla, hispana, itala, pola) -

Atentu: videbla nur ĝis la 1a de Januaro 2024 !

krome rekta elsendo sendaĵo: je 2024-01-09 je 23:15 (Pariza Tempo)

<https://www.arte.tv/de/videos/107183-000-A/kongo-im-reich-der-stille/>

kaj jen la detaloj laŭ OHCHR

<https://www.ohchr.org/en/countries/africa/2010-drc-mapping-report>

- - -

2023-12-05 Rusa lingvo - ne plu ŝatata en Ukrainjo

Jen 10 minuta doku -en 6 lingvoj, inkluzive la pola. En kiu pluraj homoj en Ukrainjo rakontas pri ilia rilato al la rusa lingvo.

Ĝis 2014 la rusa lingvo estis preskaŭ samrajtigita en Ukrainjo XXXXX necesas serĉi XXXXX

Ek de 2017 - post la akaparo de Krimeo, kaj partoj de Lugans kaj Donbas la ukraina estis la sola oficiala lingvo. La rusa estis permesita por privata uzo, kaj ofte uzata.

2022-02-24 Post la brutala agreso de Rusio al tuta Ukrainjo eĉ multaj ruslingvanoj ne plu ŝatas sian lingvon, kaj preferas uzi la ukrainan. Ruslingvajn librojn oni kolektas, por iam redoni al Rusio, aŭ eble por atendi al pli paca konduto de la orienta najbara registaro ?

<https://www.arte.tv/en/videos/110629-000-A/arte-reportage/>

- - -